

NATIONALBIBLIOTHEK  
IN WIEN

700295-A

Exp-












ÖNB



+Z81779308







THÉOPHILE CART



Trafendita

Turo



PARIZO

EL LA PRESEJO DE « LINGVO INTERNACIA »

33, Rue Lacépède, 33

1905



0,28

De



Donaco de *Societe p. l. propagation de l'Esp. Paris*

*Al S-ro NOEL*  
*Tradukinto de Rolando*

TRAFENDITA TURO

Esperante verkita

DE

TH. CART

700295-A



# Trafendita Turo

(Legendo)

En ia provinco de Sudfrancujo ekzistas turo trafendita de supro ĝis malsupro. Oni nomas ĝin la *trafendita Turo* aŭ *Turo de Geno* (france Guenes aŭ Ganelon). Ok tagojn post la malvenko de Rolando en Roncesvalo (france Roncevaux), la perfida Geno havis en sia kastelo grandan festenon. Lian perfidon neniu ankoraŭ konis. Karlo Grando tamen suspektas Genon. Enirinte subite en la manĝohalon, li demandas lin pri la morto de sia nevo kaj malkovras lian krimon.



De kiam mortis apud Roncesvalo  
Rolando, nev' de blanka Karlo Grand',  
okfoje kovris teron noktvualo;  
sed Karlo venĝos morton de Roland'.



**E**N antikva kastelo multa franca nobelo  
estas gasto de Geno perfida.

Falis ja Sarazeno, bruas do la festeno.

Franco kantas kaj trinkas avida.

Fluas vin' en pokalojn, ĝojiganta vasalojn,  
kiuj brave batalis por Kristo.

Ĉirkaŭportas manĝaĵon, prezentadas frandaĵon  
multa lerta, agema servisto.



# La Tour fendue

(Légende)

*Il existe dans une province du sud de la France une tour, fendue du haut en bas. On la nomme la Tour fendue ou Tour de Ganelon. Huit jours après la défaite de Roland à Roncevaux, le traître Ganelon donnait en son château un grand festin. Personne ne connaissait encore sa trahison. Cependant Charlemagne suspecte Ganelon; tout-à-coup, il pénètre dans la salle où l'on festoie; il interroge Ganelon au sujet de la mort de son neveu et découvre le crime.*



*Depuis qu'à Roncevaux il est tombé Roland,  
le fier neveu de Charle, à la barbe chenue,  
huit fois la nuit est revenue;  
mais Charle vengera Roland.*



*Dans l'antique château, grande est la joie.  
Les chefs vaillants, hôtes de Ganelon,  
ayant vaincu le Sarrazin félon,  
sont réunis, et gaîment l'on festoie.*

*Le vin vermeil coule à flots dans les coupes  
d'argent. On a tué maints noirs sangliers,  
maints cerfs, maints bœufs en l'honneur des guerriers.  
Les valets vont, actifs, parmi les groupes.*



Inter brua senordo malfermiĝas la pordo  
largâ, alta, kaj Imperiestro  
nun aperas en gloro, dum lumingoj el oro  
klarheligas la halon por l' Estro.

Sekvantaro solena akompanas lin, plena  
je herooj. La gastoj de Geno  
ĉe la vido de l' reĝo tuj leviĝas de seĝo.  
Perfidulo nur sidas en ĝeno.

Fore sidas silenta: sed la reĝ' ne kontenta  
malrapide aliras tuj Genon;  
lian brakon prenanta, kiel estro premanta,  
Karlo diras, tre grave, la jenon:

— Silentigâs vasaloj kaj servistoj en haloj —  
« Kie estas Rolando nev' mia? »  
Perfidulo rediris: « Reĝ', al Dio li iris. »  
— Ĉie regas silento glacia —

Karl' parolas kun voĉo de severa riproĉo:  
« Kie estas Rolando karega? »  
Staras Gen' sen koloro: « Mi ne scias, Sinjoro! »  
Tion aŭdas reĝ' ankaŭ palega.

Li denove protestas: « Diru min, kie estas  
nevo, kiun en koro mi portis? »  
Gen' respondas: « Nenion scias mi, se nur tion,  
ke laŭdir' en batalo li mortis. »

« Do certigu per juro sankta je la ĉefturo  
de l' kastelo, ke vi ne perfidis  
kontraŭ dolĉa Rolando, plej fidela en lando,  
ĉar malamo vin ĉiam dividis. »



*Tandis qu'on boit et qu'on chante, la porte  
très haute s'ouvre, et le vieil empereur  
paraît, immense, à la fauve lueur  
des flambeaux d'or, suivi de son escorte.*

*Ce sont des preux, en des combats sans nombre  
toujours vainqueurs. Or, tous les invités,  
devant le roi, joyeux, se sont levés;  
sauf Ganelon dont le visage est sombre.*

*Il reste assis, tout seul, loin de la porte.  
Charle s'avance. Il lui pose la main  
sur l'épaule, et, parlant en souverain,  
lui dit ces mots, d'une voix grave et forte :*

*— Et tous se sont tus dans la salle immense —  
« Où donc est-il Roland, mon fier neveu? »  
Ganelon dit : « Messire, il est à Dieu. »  
— Les hauts barons ont fait un grand silence —*

*Charle le Roi, la voix plus grave, insiste :  
« Où donc est-il mon cher neveu Roland? »  
« Point ne le sais, dit Ganelon tremblant. »  
— Lors l'empereur est devenu tout triste.*

*Puis il reprend encor d'un ton sévère :  
« Où donc est-il Roland que tant j'aimais? »  
Ganelon dit : « Messire, je ne sais,  
mais le bruit court qu'il est mort à la guerre. »*

*« Jure-moi donc sur la tour principale  
de ton château que tu n'as pas trahi  
mon doux Roland, car tu l'as fort haï. »  
— De Ganelon, comme la face est pâle! —*



La turego kastela forta stáras kaj bela.

Tial Gen' : Antaŭ Krist' mi atestas  
(ho malpia la vorto !) je tur' mia pri morto  
de Rolando senkulpa mi estas. »

Tuj ekstremas la mondo — de Krist' estas respondo —  
terurplena bruego aŭdiĝas.

La ĉeftur' de l' kastelo, de l' tegment' ĝis la kelo,  
nevidebla per glavo fendiĝas.

Surgenuen sin ĵetas Gen'. Pardonon li petas.

Sed memoras reĝ' karan Rolandon :  
sur la kamp' Roncesvalo mortis li en batalo,  
defendante dolĉegan Franclandon.

Por lin venĝi la reĝo perfidulon, laŭ leĝo,  
alnajligis sur krucon. La turo  
ĝis nuntempo vidiĝas, *trafendita* nomiĝas  
je memor' de malpia la ĵuro.



De kiam mortis apud Roncesvalo  
Rolando, nev' de blanka Karlo Grand',  
okfoje kovris teron noktvualo ;  
sed Karlo venĝis morton de Roland'.

La 25 de Septembro 1904.



*Mais sa tour est très massive et solide :  
« Sur mon donjon, dit-il, je fais serment  
devant le Christ que je suis innocent  
de cette mort. » Sa parole est perfide.*

*Tout aussitôt s'ouït un bruit terrible ;  
A Ganelon le Christ a répondu.  
Du haut en bas le donjon est fendu,  
comme coupé par un glaive invisible.*

*Ganelon tombe aux pieds de Charlemagne.  
Mais l'empereur pense à son cher Roland.  
Pour douce France, il est mort combattant  
à Roncevaux, aux défilés d'Espagne.*

*Pour le venger, Charlemagne fit mettre  
le traître en croix. On voit encor la Tour  
de Ganelon. On la nomme en ce jour  
la Tour fendue, en souvenir du traître.*



*Depuis qu'à Roncevaux il est tombé Roland,  
le fier neveu de Charle, à la barbe chenuë,  
huit fois la nuit est revenue ;  
mais Charle a vengé Roland.*

TH. CART.



# NOTETO

pri la

Ritmo de l'Esperanta Poemo

Unua kaj lasta strofoj


. / . / . / . / . / .

Ceteraj strofoj

.. / .. / .    .. / .. / .

.. / .. / .. / .







VENDATA POR LA BLINDULOJ

*Se vend au profit des Aveugles.*







